

# ESPERANTO JE LA SERVO DE L' TUTMONDA PROLETARO

# SENNACIULO

OFICIALA ORGANO DE SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA

Korespond-adreso: "Redakcio de Sennaciulo", Colmstr. 1, Lelpzig-Stö. (Germ.)

Gvidanto: Ekzekutiva Komisiono de SAT  
23, rue Boyer, Paris XX

Administranto: R. LERCHNER  
Colmstrasse 1, Lelpzig-Stötteritz

## ILIA PATRUJO

de *Gustave Hervé* — 1910

### Kelkaj vortoj de l' tradukinto

Sendube kelkiuj el vi, kiuj estis el la kelkaj dekoj da esperantistaj militantoj, grupiĝintaj apud la unua "Laborista Esperantisto" memoros la maldikan broŝuron de s-ro Gustave Hervé, titolita "Kontraŭpatriotismo", kaj kiu estis unu el la unuaj broŝuroj eldonitaj de la laboristaj esperantistoj.

Nuntempe ni troe forgesis la nomon kaj precipe la verkojn de s-ro Gustave Hervé.

Mi do memorigu, ke s-ro G. Hervé estis antaŭ 1914 la ĉefa militanto kaj kvazaŭ la animo de la maldekstra flanko de l' franca socialista partio; eks-profesoro de Universitato, senoficigita pro sia socialista aktiveco, li gvidis ĉiutagan gazeton "La Socia Milito" kaj verkis multajn librojn kaj broŝurojn ĉiuj direktataj kontraŭ patriotismo; li eĉ estis malliberigita pro sia kontraŭpatriotisma propagando; lia proceso havis universalan famegon, almenaŭ ĉe la socialistaj medioj.

Ve! en 1914 "La Socia Milito" fariĝis "La Venko" kaj Hervé fariĝis freneza patrioto, nune li estas unu el la plej brugantaj francaj faŝistoj. Ne gravas. Homoj pasadas, ideoj postrestas. Nu, ŝajnas al mi, ke la idearo de la antaŭmilita Hervé tre alproksimiĝis nian SAT-idearon. Ĉar nia SAT penas ĝisfunde kontraŭbatali ĉiun naciismon, elradikigi el la homaj cerboj ĉiujn ĝis la plej malgrandajn radiketojn da naciismo, neniu SAT-ano povas esti patrioto; kontraŭe, ĉiuj SAT-anoj devas esti fervoraj kontraŭpatriotoj; ni ĉiuj nepre devas konsenti, ke ne ekzistas por ni nacia defendo en kapitalista reĝimo, ke ni nepre ne devas partopreni nacian militon, sed kontraŭe, ke ni nepre devas partopreni internan militon por starigi socialistan sociordon.

Eble povas esti, ke iu kontraŭpatrioto ne tute estu sennaciisto (tamen tio estas tre

dubinda kaj diskutebla); sed tute ne povas esti, ke se sennaciisto — aŭ sennaciulo — ne estu tute kontraŭpatrioto.

Tial mi opinias, ke ankoraŭ estas ĝustatempe paroli pri la verkoj de Hervé.

Mi eĉ ĉi tie esprimas mian deziron, ke "Sennaciulo" iam enpresu tekston de la suprenomita broŝuro t. e. "kontraŭpatriotismo."

Miaflanke mi entreprenis tradukadon de grava verko de Hervé "Ilia Patrujo" — libro 315 paĝa, kiun vi nepre legos ĉu iom post iom en Sennaciulo, ĉu libraforme se ni sukcesas ĝin eldoni. Ĉi sube vi legos el tiu libro la antaŭparolon, kie Hervé difinas la sintenadon de la kontraŭmilita epoko.

R. S.

En senlarma okul' kaŝante la sentojn,  
Ili sidas kaj teksas kaj grincas la dentojn:  
Malnova mond'! ni teksas en pen'  
Morttukon al vi kun triobla malben' —  
Ni teksas, ni teksas!

### Antaŭparolo de l' Aŭtoro.

Tiu libro kontraŭ la Patrujo ne estas verko ekskluzive unuopa, de intelektulo malfabligita kontraŭ la socio pro universitataj malfeliĉetaĵoj, aŭ kiu ŝatus ĵongli per abstraktaj ideoj pro emo je pura logiko, aŭ por vana plezuro subteni paradoksojn. Ĝi estas fidela esprimo de l' opiniaro de tuta grava grupo konsistanta el instruistoj, industrilaboristoj, malgrandaj komercistoj, kamplaboristoj, malgrandaj kulturistoj, renkontitaj dum trijara propagando en departamento "Yonne".

Ĉiuj estis patriotoj; estis tempo, kiam ni estis decidantaj fordoni nian vivon por patrujo, kiam ni preskaŭ ĝoje estis decidantaj morti por depreni Alsaco-Lotaringon.

Hodiaŭ ni estas kontraŭpatriotoj. Oni bone nin komprenu.

Ni tute ne asertas, ke amo de naskiĝa vilaĝo, ke naskiĝvilaĝa patriotismo, kiu tute ne estas nacia patriotismo, ne estu natura sento, tre vigla ĉe multiuj: ni, kiuj malŝategas nunajn patrujojn, konservas por la loko, kie ni naskiĝis iun filan respektan amon.

Ni ankaŭ neniam asertis, ke ne ekzistas inter nunaj nacioj tiaj, kiaj rasoj kaj historio ilin faris, notindaj diferencoj ĉe karakteroj kaj temperamentoj.

Ni estas konvinkataj, tiom kiom iu ajn patrioto, ke la patrujoj estis iam necesaj: plej bona pruvo estas, ke ili naskiĝis kaj vivadis: ni eĉ opinias, ke ilia estado estas povinta, dum iaj epokoj kaj en iaj cirkonstancoj, kunhelpi al ĝenerala pliperfektiĝo de l' homa speco.

Fine, ni perfekte komprenas, ke niaj praavoj, la revoluciuloj de 1789 kaj 1793j. estas estintaj patriotoj, en tia okazo ni estus tio estintaj tiom, kiom ili.

Tiuj motivoj ne malebligas, ke ni proklamiĝu kontraŭpatriotoj. Estas plena aniĝo al socialismo, kiu kondukis nin al tiu spirito-stato.

Patriotismo grupigas la homojn laŭ ilia devena lando, tian, kian la okazintaĵoj de historio ĝin difinis; meze de ĉiu patrujo, riĉuloj kaj malriĉuloj, dank' al patriota ligilo, konsistigas unuecaĵon kontraŭ eksterlando.

Socialismo grupigas la homojn, malriĉajn kontraŭ riĉajn, klason kontraŭ klason, ne priatente malsamecon nek de raŝo nek de lingvo, super ĉiuj historiaj landlimoj.

Eĉ inter respublikanoj — patriotoj, kontraŭ militaristoj, kaj pacifistoj, tiaj, kiaj s-ro Clemenceau, kaj la socialistoj internaciistoj, kiuj ni estas, socialismo fosas veran ab-

ismon: la patriotoj de l'burga respublikano prikonsideras kiel havante unuarangan gravecon la politikajn formojn; kontraŭe, ni — kvankam ne neante superecon de respublika politika formo super la monarĥa — prikonsideras politikajn malsam-ecojn kiel estante duarangaj tiam, kiam ili kovras samajn ekonomiajn formojn.

Respublikanoj kiel s-ro Clemenceau rigardas politikan formon de nuna Francio tiel supera, kiel la angla aŭ la germana, ke ili batalus, armiloj ĉe la pugno por defendi ĝin kaj kun ĝi la francan propran spiriton kiun ĝi ŝirmas kaj kies kvazaŭa konkreta figuro ĝi estas.

Kontraŭe, ni batalos nur por efektiviĝi aŭ por defendi — kiam ni estos ĝin efektiviĝintaj socian ordon superan kiel la aliaj, ne nur pro politika formo, sed ankaŭ pro ĝia maniero por produktado kaj distribuado de la riĉaĵoj.

Ni do ne batalos por defendi la nunajn patrujojn; sed ni batalos, kiam estos necese, por efektiviĝi socialistan reĝimon aŭ por ĝin defendi, kiam ni estos sukcesintaj ĝin starigi.

Sekvas de tio, ke la respublikanaj patriotoj akceptas militon kontraŭ eksterlando — kiel bedaŭrindaĵo, ni konfesas — por defendi nunan patrujon; kontraŭe ni akceptas ununuran militon t. e. enlandan militon, socian militon, klasmiliton, la nura kiu nuntempe, en Eŭropo de la XX. jarcento, povas esti fruktodona por la ekspluatatoj ĉiulandaj.

Ni ne sentas — kiel oni akuzas nin — fiplezuron, kiam ni malmildece esprimas tiujn opiniojn.

Ni tro bone sentas, ke ili abrupte puŝadas respektindajn antaŭjuĝojn.

Verdire estas iomete ĉagrenige al ni, ke niaj kontraŭpatriotismaj deklaroj estu ekspluatotaj, dum la proksima voĉdonperiodo, kontraŭ la socialistaj kandidatoj, kaj malgajnu al ili tie-ĉi kaj tie kelkajn voĉojn; se socialismo volas progresi kaj profunde eniĝi en la amasoj, necesas, ke ĝi rezignas esti nek ekskluzive nek precipe balotelektema kaj parlamentema partio; ĉiaokaze, la balotelektaj konsideraĵoj ne devas malhelpi propagandon por integrala socialismo.

Pli multe malĝojegigas nin la scio, ke ni ofendas la intimajn opiniojn de multaj honestaj homoj, kiu rigardas patriotismon kiel estante religion, kaj moralan principon.

Cetere, por starigi laikan sociordon, necesas kaj ĉiutage ankoraŭ necesas puŝegi religiajn antaŭjuĝojn tiom respektablajn, kiom patriotismo.

Ne estas kulpo nia ĉu nova socio, kiu nepre naskiĝos, eliras el la enventraĵo de tiu estas mortanta nur pere de peniga kaj doloriga naskado.

El la franca tradukis Robert Soudant (140).

## Progreso kaj Libereco . . .

Antaŭ la mondmilito, Francio estis la lando kie la revoluciuloj sin rifuĝis, sed post la milito estas tute alia afero; nun la plej simpla hispana respublikano, estas tuj persekutata de la policanoj kiel danĝera kaj ne dezirata homo, kiel diras la burgaj gazetoj; mi tute ne komprenas, kial la franca respubliko povas persekuti la hispanajn respublikanojn sub la koverta, ke la hispanaj respublikanoj ne estas veraj respublikanoj sed kom-istoj, kiuj venas semi tie, la ruĝan tritikon kiel diris Brizon, sed tio estas tute ne vera, ĉar multaj hispanoj preskaŭ ne interesas sin pri la kom-ista partio, tamen la franca burĝaro timas la hispanan revolucion forgesante, ke la nuna stato de Hispanio ne povas daŭri plu longan tempon, ĉar la laboristaro estas devigata elmigri de sia "Patrio" pro manko de laboro kaj . . . pano.

Eble la legantaro de *Sennaciulo* trovas stranga la aferon, sed nun kun nia bela progreso kaj libereco, oni povas ĉion kredi, ĉar ĉiu tago estas jarcento; do mi volas sciigi al vi la fiagon de nia kara "mastro" kiu volis moraligi la malfeliĉan Hispanion, mi diras mastro, ĉar li nun estas la mastro de tiu ŝtato.

Dum la pasinta monato, en nia provinco de Orientaj Pirineoj, estis viditaj pli ol kvindek hispanaj policanoj kiuj spionis kaj spionas la hispanajn laboristojn kiuj laboras ĉi tie; iam la revoluciuloj, kiam ili estis devigataj elmigri el Hispanio, ili estis trankvilaj en Francio, sed nun la afero ŝanĝiĝis, nun nur por esti respublikano oni persekutas lin kiel krimulo la plej danĝera de la mondo.

Ofte mi vidas la filojn de fremduloj (alilanduloj) iri al la preĝejo kiel en sia hejmlando, tiam tio ne estas politiko, sed se oni parolas pri la monarĥio de Hispanio kaj pri la tre sankta reĝo, tiam oni estas spionata kiel danĝera al la "ordo" de la lando: feliĉaj landoj kie estas respubliko!!! sed iom pli tolerema ol en tiu nacio, kie post la venko de la maldekstra bloko, la laboristoj estas pli ĝenataj ol dum la nacia bloko; mi kredas, ke post la traktado de Hispanio kun Francio, la hispana faŝismo, ne nur regas en Hispanio, sed eĉ en aliaj landoj.

Hispanaj kamaradoj; rigardu la militon ĉe la maroka teritorio, ĝi estas nur buĉado de proletaroj, dum la riĉuloj promenas, la filoj de la laboristoj estas ĉe la batal-kampo defendante la interesojn de la parazitaj; proletaroj tutmondaj; rememoru, ke post la milito, la samaj armiloj servas por silentigi vin, en Barcelono multfoje la laboristoj sur la stratoj estis batitaj kiel alilanduloj, do vi povas bone kompreni, kie estas la vera malamiko kontraŭ kiu ni devas nin defendi, en la tuta mondo estas nur unu malamiko: la kapitalismo, kiu kriegas kontraŭ la malamikoj de la "Patrio" sed poste, se ili bezonas, ili ordonas al policanoj por spioni nin en eksterlando mem, tio estas vera progreso

por la parazitaj, persekuti la malfeliĉajn laboristojn eĉ en aliaj landoj, se tio estas progreso kaj libereco, mi demandas min, kio estus malprogreso kaj sklaveco; tra la jarcentoj la homaro kredis rompi siajn ĉenojn, sed ĝi eraras, nun ili estas pli fortaj ol dum la antikvaj tempoj.

Malgraŭ tio, venos la tago kiam la tutmonda proletaro sub la ruĝa standardo, forpelos la parazitajn kaj vivos sen landlimoj kaj spionoj; oni devas fidi pri la estonteco de venontaj generacioj edukitaj sen dio, sen sklaveco, nur per la vera scienco.

3959

## Centra malliberejo en Kaunas

Legadante "Sennaciulo" kaj aliajn lab. gazetojn ni vidas, ke ĉie, kie nur estas lab. movado en la burgaj landoj, tie estas la malliberejoj plenigitaj kun arestitaj revolucianoj. Videble, ke kie nur la laboristoj levas sian kapon kaj sciigas siajn pravajn postulojn, ili estas persekutataj per diversaj rimedoj. Krom tio la laboristoj trairas tutan vicon da suferoj: batadojn, turmenton, malliberejon kaj aliajn. Sed la persekutojn je la laboristaro, la burĝaro de diversaj landoj, ĉiu plenumas laŭ sia maniero.

Precipe fortaj estas la persekutoj je la laboristaro, kaj laŭ siaj kruelecoj solaj, en la koloniaj landoj Hindio, Egiptio k. a., en la novnaskiĝintaj, post la mondmilito tiel nomitaj ĉebaltaj landoj Estonio, Latvio kaj Litovio, kaj en Polio, Rumanio kaj Bulgario.

Pro la persekutado je la laboristaro, en unu de menciitaj landoj, nome, Litovio, mi volas per tio rakonti, ĉar tio estas sola okazo en la historio de la laborista persekuto.

Estas konate al ĉiu leganta laboristo, ke la malliberejoj de Litovio estas plenigitaj kun junaj kaj maljunaj laboristoj, infanoj kaj soldatoj kuraĝintaj malkaŝe elpaŝadi per siaj rajtoj, aŭ ili estas viktimoj de la provokacio litova, spiona reĝa organizaĵo "žvalgyba" t. e. politika polico.

Ankaŭ ne pli bona ol la "žvalgyba" elmontriĝas la litova juĝistaro "prava, indifera kaj blinda" kiel ĝi sin mem rekomendas. Kiel ĉiu burga juĝejo ĝi fikondamnadas, estas aŭ ne estas faktaj montroj, al longaj jaroj de malliberejo. Komprenable, ke la malfeliĉuloj enfalintaj en ĉi tiujn malliberejojn, se ili ne mortas, jam ne eliros el tie, kiel korsanaj homoj, ĉar antaŭ ol enkarcerigi ilin, oni bestece batadas ilin en la menciita žvalgyba aŭ en la policejo.

Tio ĉi videble estas kvazaŭ nenio por la burĝaro, la morto de la revoluciaj proletoj ĉe tiaj cirkonstancoj tro malrapide aliras. Por ke ĝi pli rapidiĝu, ili elektis novan rimedon: batadi per fiaj manieroj la senkulpajn kaj malsanajn arestitojn.

Mi jam skribis, kaj en "Senn." estas presita, pri la malsatado de la politarestitoj en la malliberejo de Kaunas en kiu partoprenis pli ol 150 homoj. Tiu ĉi

malsatado estis ĉe la politarestitoj sukcesplena. Sed ĉiuj promesoj donitaj de la mallibereja administracio ne estis plenumitaj. Ree, pro sia morala frapo la mallibereja adm. atendis taŭgan momenton por venĝi. Tiu momento estis la tago de la ligo de la tutmonda lab. junularo.

La arestitoj politikaj volis trankvile soleni ĉi tiun feston kaj ekvestante ruĝajn bantetojn kaj ekkantante la "Internacio" volis karakterizi la signifon de ĉi-tago per paroloj kaj referatoj por la prol. junularo, sed laŭ la ordono de la mallibereja ĉefo Rormin, kiu kiel abomena timemulo kaŝiĝis malantaŭ siaj servuloj eniris la ĉelojn la sadisto, korpusegvidinto Brazy.

Kune kun aro da servistoj kaj minacante per revolveroj deŝiris la ruĝajn bantetojn kaj ĉirkaŭ 30 k-dojn eltrenigis el la karcero, ilin batante en la karceroj kaj kameroj. Inter aliaj k-don Kälendon I. elartikigis fingron, kion la kuracisto konstatis. Sed tio ne estas ĉio. La estintajn en karcero k-dojn Prejkšas, K., Lifšis, A., Lukoviĉ, A., Jofe, A. kaj Stumbris, I. estis trenitaj necesojn, kovrita al ili la kapo por ke ne estu aŭdata ilia voko pro helpo. Ankaŭ la nudaj partoj de la korpo estis kovritaj per malsekaj sakoj, por ke ne restu signoj, kaj ĉiun el ili oni donis po kvardek ĝis kvindek vipobatojn. La ekzekuton partoprenis la menciitaj, oficistoj Brarys, Kälak-eviĉ, Mackeviĉ kaj aliaj. La sama Brarys dum la sekvontaj tagoj trairedis la politikajn ĉelojn kaj batadis la arestitojn. Precipe kruele estis batitaj Zukovckik k. a. La k-dinojn oni traktis ne pli bone. Oni ĉiujn enkarcerigis.

Ĉiuj do, ĉirkaŭ cent gek-doĵ estis punitaj per kamera karcero, t. e. oni reprenis la matracojn, litkovrilojn, ne permesis promenadi, renkontiĝojn kaj donacojn de parencoj, kaj post ĉiu tria tago nur donis varman manĝaĵon.

Tiam la mallibereja kuracisto s-ro Viršilo postulis, ke oni donu por helpi la batitojn; la mallibereja ĉefo, malpermesis, kaj nur per prokuroro la kuracisto povis rigardi la malsanulojn kaj konstatis multajn vundojn sur la korpoj de la enkarcerigitoj.

La politikaj arestitoj ne havinte sian propran frakcion en la litova Sejmo — ĉar la deputatoj de la "Lab. Grupo" estis enkarcerigitaj, kaj deputatoj Vilunas kaj Matulajtis sidas ankaŭ ĝis nun en la malliberejo — estis devigitaj, komuniki pri tiu okazo al la socialdemokrata frakcio, kiu enportis interpelacion al la Sejmo. Sed per la multeco de la dekstraj deputatoj la interpelacio estis ignorita rapide. Tio signifas, ke ĉiu oficisto povas nin batadi sen respondeco. La arestitoj politikaj de la Poneveza malliberejo ekaŭdinte pri la ekzekuto al aliaj k-doĵ en Kaunas proklamis unutan protest-malsaton kaj elsendis protestrezolucion al diversaj landaj instancoj.

Sciu la k-doĵ laboristaj kaj vilaĝanoj de ĉiuj landoj, kaj precipe la k-doĵ de Anglio, pri nia situacio, kiu estas tre terurega. Sciu ili, ke la reprezentuloj de la litova burĝaro por la mono de la litova proletaro

vojaĝas tra iliaj landoj kaj dirinte pri la bonstato de la lando kaj demokratismo estas fiaj falsigantoj. Ankaŭ sciu ili, ke la helpo kaj la pruntoj donitaj de iliaj registaroj al la litova burĝaro estas nur rimedo por pli sklavigi iliajn gefratojn — litovan proletaron, sciu pri tio la laboristoj kaj vilaĝanoj de ĉiuj landoj kaj konsekvencu.

I. Neretis.

## Registara atako kontraŭ la ruĝa helpo en Anglio

Inter la kvar dum la lasta tempo en Anglio arestitaj laboristgvidantoj ankaŭ troviĝas la sekretario de la anglia sekcio de la Internacia Ruĝa Helpo, k-do Wal Hannington, kiu samtempe okupis gravan postenon en la angla senlaborula movado. La policistaro traserĉis la oficejon de la ruĝa helpo kaj forprenis la tutan literaturon, ĉiujn leterojn kaj skribaĵojn, entute ĉiun surskribitan pecon da papero, kiu troviĝis en la oficejo. La sama ankaŭ okazis en la oficejo de la laborula movado, en kiu k-do Hannington ankaŭ laboris. Entute ĝis nun estas arestitaj 12 gvidantaj personoj de la angla laborista movado, kiuj parte post pago de kaŭcio estas liberigitaj. La "Daily Herald" (la socialdemokrata organo de Anglio) raportas, ke ili ĉiutage ricevas multajn rezoluciojn de sindikataj grupoj, lokaj grupoj de la laborista partio kaj de aliaj laboristaj organizaĵoj, en kiuj ili esprimas "sian opinion" pri la arestigoj — sed ke ili ne povas publikigi la rezoluciojn, por ke ili ne peku kontraŭ la leĝo rilate enmiksado en esplorprocedo ne jam finita. La mallonga gazetnoto enhavas la signifplenan sciigon, ke la amaso de la angla laboristaro jam nun en regionoj de la lando demonstrie protestas kontraŭ la unua publika apero de la faŝista terurondo en Anglio.

## Daŭra escepta leĝo en Hungario

La hungara centro de mortigistoj Bethlen-Horthy nepre volas kondamni k-don Rakosi kaj siajn kunarestitojn eksterleĝe, nome pendigi ilin, kvankam laŭ la jurista koncepto la eksterleĝa juĝprocedo en Hungario de post 1923 ne plu ekzistas. Al jurista protesto la hungara justecministro en la Nationalkunveno deklaris jenon:

"Pri la laŭleĝeco de la procedo ne povas ekzisti dubo, kaj se la publiko ne scias pri la plua ekzisto de la eksterleĝa stato, tio ne estas kompetenta. La eksterleĝa stato estas nuligebla laŭ nia leĝo nur, kiam la kaŭzoj, kiuj dum la tiam tempo devigis nin al proklamo de la eksterleĝa stato, ne plu ekzistas."

El tio klare estas ekkonebla la starpunkto de la hungara fijusteco, kiu en la momento, kiam radikala laboristmovado estas sentebla, la ne plu ekzistantan leĝon esceptan aŭtomate vekas el sia dormo, por senskrupule mortpendigi revoluciajn laboristojn.

## La Kiŝinev-a proceso (Rum.)

Jam en la lasta numero ni raportis mallonge pri la proceso en Kiŝinev kontraŭ la 500 kamparanoj de Tatar Bunar. Ĉar tiu proceso kontraŭ personoj, plej parte senkulpaj, estas unu el la plej strangaj, do ni priskribu ĝin iomete pli detale.

### Nekredebla okazintaĵo — el la proceso

En unu de la lastaj kunsidoj la defendantoj per lerta demandado devigis la atestanton de la akuzantoj, la ĉefserĝenton *Socolesku*, rakonti pri la teruraĵo ne jam antaŭe okazinta en la tuta historio, nome, kiel la rumana ĝendarmaro turmentis la kamparanojn *M. Scerbaticov* al morto okaze de la Tatar Bunar-a ribelo.

La postengvidanto Vindor enŝovigis Scerbaticov nude kaj katenita en sakon, en kiu ankaŭ troviĝis sovaĝa kato. La ĝendarmoj nun per bastonoj bategis sur la sakon. La kato pro la doloro sovaĝigita disŝiraĉis per la ungegoj la korpon de la malfeliĉa kamparano. Tiu turmentado daŭris ĝis kiam la kato estis morta. Poste oni ĵetis Scerbaticov en barelon plenigita per varmega akvo, kaj liajn vundojn, kiuj larĝe malfermiĝis, oni superŝutis per salo.

Per ĉi tiu rimedo oni elpremis el la kamparano "Konfeson" pri okazintaĵoj, kiuj tute ne okazis.

### Kiuj estas la akuzitoj?

Dum la proceso en Kiŝinev oftfoje okazis, ke la atestantoj, ankaŭ tiuj de la akuzantoj, inter la 500 akuzitoj ne povis trovi eĉ ne unu, kiu portis armilojn dum la ribelo kaj partoprenis la okazintaĵon de la sangaj tagoj. La edzino de la mortpafita de la ribelantoj, komunumoficisto Sandu, deklaris, ke la mortigantoj de ŝia edzo jam de longe estas ekzekutitaj. Inter la 500 ŝi trovis neniun, kiu partoprenis la ribelon aŭ nur portis armilojn. La atestanto Zamfis same deklaris, ke neniun el la akuzitaj kamparanoj portis armilojn, ĉar ja la ribelantaj bandoj senescepte estas malaperintaj dum la enmarŝo de la rumanaj trupoj. El tiuj eldiraĵoj estas tute klare ekkonebla, ke la 500 akuzitaj kamparanoj ne estis ribelantoj, sed nur homoj, kiuj estis suspektindaj al la ĝendarmaro pro siaj opinikonvinkoj.

### Bratianu postulas severajn verdiktojn

La proceso klare montris, ke la akuzitaj kamparanoj estas nur kunpelitaj kamparanoj senkulpaj el la vilaĝoj de la "ribela distrikto". Ili partoprenis nek la preparojn nek la ribelon mem. Tamen la ministroprezidanto Jonel Bratianu, ĉestinta la proceson, deklaris senskrupule al la gazetrepresentantoj:

"La ĉefakuzitoj estas anoj de la kamparana partio. Sekve devas esti la rezulto de la proceso severaj verdiktoj, por montri al la tuta mondo, ke la partio de la kamparanoj estas partio de la anarĥio."

## Max Hölz strikas rifuzante la manĝaĵon

La revolucia laboristgvidanto Max Hölz en Germanio jam delonge penas reokazigi proceson kontraŭ si. Sed la germana justeco respondis al tio per pli terura subpremo, kaj la arestejaj instancoj igis lin en alian arestejon. Do malesperante li aplikis la protestrimedon rifuzante ĉiun ajn manĝaĵon.

## La "Mossul"-demando antaŭ la internacia juĝejo

La 26. oktobro okazis en Haag traktado pri la angla-turkia konflikto en Mossul-afero. Antaŭ komenco de la kunsido la prezidanto de la internacia juĝejo komunikis deklaron de la turkia registaro, ke por ili ne ekzistas kaŭzo, sin reprezentigi antaŭ la internacia juĝejo, ĉar la starpunkto de la turkia registaro ĝenerale estus konata. Por Turkio la tuta demando estus pure politika, kaj pro tio nek la konsilantaro de la Ligo de Nacioj, nek la internacia juĝejo rajtas decidi pri ĝi. Kvankam la konflikto inter Turkio kaj Anglio ŝajne ne estas grava, tamen ĝi estas signo por la neforigeblaj konfliktoj interkapitalistaj. B.

## Enterigo de Londona Ruĝulo

La kamarado mortis. — Baldaŭ post kiam ni aŭdis, ke la terura operacio sukcesis, kaj ke li post nelonge laboros denove kun ni, alvenis la novaĵo. Li mortis.

Ni kolektiĝis la matenon de la enterigo ĉe la loka ejo de la Kompartio (al kiu apartenis la mortinto), eble nur 50 entute, sed multaj devis iri en siajn laborejojn aŭ deĵori speciale kaŭze de la aresto de la gvidantoj. Malgraŭ tio, alvenis la Sekretario de la London-Distrikto-Komitato; ankaŭ mi rimarkis kun plezuro la Sekretarion de la loka Laborista Partio — li venis spite la mandaton, de la jara Konferenco de la Laborista Partio, ke komunistoj ĉiamaniere estu ekster ĝia vicaro. Venis kelkaj kamaradoj de malproksimaj partoj de la urbego — partiano kaj kunlaborintoj de la maŝin-fabrikoj. Ĉiuj portis ruĝan brak-rubandon kaj alte staris la belega standardo sendita de la moskvaj laboristoj.

Fine oni ordonis: ni marŝu ĝis domo de la partiaj gekamaradoj kiuj sindoneme estis ricevintaj la mortintan kamaradon en sian hejmon. Ĉe la domo mi vidis la tri funebrajn kaleŝojn kaj la ĉerk-veturilon — ĉio tre simpla, ĉar tre malriĉa estis la kamarado, ofte eĉ senlabora. Ses kamaradoj, inter ili la gastiganto de la mortinto, eniris la domon kaj forportis la ĉerkon.

Kiaj belaj floroj! Li, kiu dum vivo sendube malofte povis aĉeti florojn, nun kuŝas sub vera ĝardeno, klu tamen vidigis la ruĝegan ĉerk-kovrilon; plej vid-

ebla el ĉiuj elstaras la flordonaco de la loka Partio — ora martelo kaj falĉilo sur skarлата fundo.

Ni komencas moviĝi. La mortinta kamarado, kiel ofte kiam vivante, antaŭiris; sekvis liaj familianoj en la kaleŝoj, poste ni piediris. Ĉiuj en la stratoj rigardegis, rimarkante la ruĝan ĉerk-kovrilon, la Moskvan kaj alian grandan nur-ruĝan standardojn. Burĝuloj devis kvazaŭ honorati la malŝatatajn simbolojn, levante ĉapelon dum pasas la funebra procesio; ili nepre respektu kadavron, eĉ de iu kiu vivante ricevas nur ilian malestimon.

Post kvin minutoj, alia ordono: ni eniru omnibusojn, per kiuj ni atingu la tombejon. Kial? Jes, ja, kompreneble; la mortinto estis malriĉa; la kosto estus tro, se oni malrapide paŝus; la ĉevaloj devas troti. Do, ni surrampis omnibusojn. Plua malfacilaĵo; la kondukisto — li, laboristo! — malpermesas la surtenon de la Moskva standardo, kvankam ĝi, tere kuŝante, neniun ĝenas. Du kamaradoj elportas ĝin kaj rapidiĝas piede al la tombejo.

Ni atingas la lokon, eniras. Ne, ni ne eniru sub tiu arko, ĉar ĝi apartenas preĝejon kaj nia estas sen-religia ceremonio. Kamaradino klarigas al mi, ke ĝenerale estas funebra sonorilo intermite sonanta, sed... tio kostus 5 ŝilingojn plue, do... Mi komprenas — la mortinto estis tre malriĉa!

Ni kune iras al la fosajo ĉe kiu estas jam la nigre-vestitaj geparencoj; mi rekonas la vidvinon, lastfoje vidita ĉe Partia balo. Nu, ŝi sin apogas sur brakon de bopatro; ŝi estas mortpala.

Estas alvenintaj ĉiuj; la belaj floroj kuŝas sur la malseka kruda argilo, freŝe elfosita. Granda silento. Fine la k-do de la Distrikto-Komitato parolas, simple, sincere, laŭde kaj danke: ĉu la mortinto ne ĉiam faris sian tutan eblon; ĉu li ne ege laboris kaj sin donis; kvankam ne multe konata ekster la loka partio, certe li multe mankos al ĝiaj anoj; ni sekvu la noblan modelon.

Ni aŭdas la plor-ĝemojn de la vidvino; ankaŭ la juna frato de l' mortinto ploras; ĉu niaj okuloj povus resti sekaj? Treege kortuŝite, ni kompatis la junajn afliktitojn, speciale kiam nepre venis tempo kiam oni devas mallevi la ĉerkon...

La organizanto de la loka partio komencas sian paroladon. Li ne povis longe daŭri; la vidvino, venkita de sia aflikto, laŭte ĝemis; jen la krio de doloranta koro kiun povus konsoli nenia politika sistemo. Ni iĝas primitivaj kompatantaj animoj; ni komprenas ŝian malĝojegon. La kunulon ŝi devos lasi por ĉiam en tiu terura fremda loko; ŝi devos foriri por trovi hejmon sen edzo, infanojn sen patro. La mortinto estas tre malriĉa, sed la du posedis trezorojn unu en la alia.

Ni rifuĝis en kantadon. "La Ruĝa Standardo" tremvoĉe ordonas la juna organizanto, poste du strofojn el "l' Internacio". Granda silento, kaj foriras malrapide la familianoj.

Ni poste sekvas, ĉiu pensante, kiel ege mankos al ni la mortinta k-do. Li estis tre malriĉa homo, sed, spite tio aŭ eble pro tio, li estis ĉiam batalanto en la klas-luktado. Ni dankeme salutu lin!

E. K. L.

## INTER NI

— Unue mi estas SAT-ano, due partiano, diras iu.

— Unue mi estas partiano, due SAT-ano, respondas aliu.

Kaj inter ambaŭ okazas iajfoje vigla disputo. La unua riproĉas al la dua lian malzorgon pri la esperanta afero, kaj la dua rebatas, ke multe pli urgas la partilaboro.

La interdisputo kompreneble ne kondukas al praktika konkludo, tial ke maltrafe starigata estas kutime la demando. Povas ja okazi, ke ambaŭ disputantoj estas same pravaj.

Mi prenu konkretan ekzemplon.

Temas partopreni manifestadon, kies sukceso aŭ fiasko povas havi gravan sekvon por la tuta laboristaro. Nu, ĝuste je tiuj tagoj kaj horoj okazas la kutima esperanta kunveno.

Kion devas fari klaskonscia SAT-ano?

Sen ia ŝanceliĝo, li devas nepre foresti la esperantan kunvenon. Tiaokaze, li devas esti UNUE partiano (aŭ sindikatano ktp.) kaj partopreni la manifestadon.

Sed aliookaze temas propagandi por Esperanto kaj por SAT. Kaj tio okazas ĝuste la tagon kiam kunvenas kutime la partianoj.

Kion faru klaskonscia esperantisto?

Senhezite li malestu la partian kunvenon; li estu tiam UNUE SAT-ano.

Mi klarigu.

Klaskonscia esperantista laboristo, sekve SAT-ano, havas la firman konvinkon, ke la partiaj kaj sindikataj gvidantoj malzorgas la interesojn de la proletaro, ne okupigante pri solvo de la mondlingva problemo. Li opinias, ke la laboristaro povas emancipiĝi nur se ĝi estas tutmonde organizita, kaj ke plie tiu organiziteco povas esti trafa kaj efika nur se inter la membroj ekzistas lingva komuneco.

Sekve, en ordinaraj okazoj, klaskonscia esperantisto logike devas esti UNUE SAT-ano.

Sed, eksterordinare, se temas, ekzemple, defendi sian organizaĵon kontraŭ faŝista bandaĉo, ni tiam estu unue partianoj aŭ sindikatanoj — due SAT-anoj.

Abstrakto kaj metafiziko estu for el niaj vicoj...!

Ni ne forgesu, ke la vivo ne adaptiĝas al principoj, eĉ se ili estas tute ĝustaj, sed ke temas adapti la principojn al la vivo.

— Ĉu unue SAT-anoj?

— Tio dependas de la tempo, de la loko, de la cirkonstancoj. Almenaŭ ni estu ĉiam, ĉie, ĉiel klasbatalantoj, firme konvinkitaj, ke la SAT-laboro nepre necesas por ebligi la finfinan emancipiĝon de l' tutmonda proletaro.

IUELIE



2. Dum epidemioj infektiĝas tuta loĝantaro de distrikto aŭ lando. Do, la infekto per baciloj estas fakto.

3. La baciloj ĉeestas en ĉiu korpo malsana de infekta malsano. Do, la baciloj kaŭzas la malsanojn infektajn.

4. Antaŭ la enkonduko de vakcinado faris epidemiojn la variolo, nun ne. Ĉu tio ne estas triumfo de medicina scienco?

Al la unua protesto mi respondas, ke ne estas tute certe, ke du homoj manĝantaj ĉe la sama tablo traktas siajn stomakojn egale. Ili povas elekti malsame, laŭ persona gusto; unu povas manĝi duoble pli multe ol la alia. Ankaŭ montris la sperto, ke homoj kiuj ofte malvarmumas malofte suferas de aliaj malsanoj pli teruraj. Ĉar ili eliminis la manĝaĵajn venenojn el la korpo iom post iom, tial ne necesiĝas granda elimino, t. e. forta malsano. Laste mi diros, ke dieto de freŝaj fruktoj kaj verdajoj ne nur malebligas la aperon de malvarmumo sed eĉ rapide kuracas ĝin, se ĝi jam aperis. Iu ajn povas fari la provon.

Al la dua protesto oni povas respondi, ke malsanoj epidemiaj plej ofte venas dum aŭ tuj post grandaj militoj, kiam malabundas la freŝaj manĝaĵoj, kaj la homoj multe manĝas peklitajn viandojn kaj aliajn konservitajn manĝaĵojn.

Rilate la tria mi protestas kontraŭ la nelogikeco de la konkludo: oni povas same bone konkludi, ke la malsano kaŭzas la ĉeeston de baciloj, konkludo kiu estas multe pli verŝajna, ĉar baciloj ne trovas nutraĵon en korpo sana.

La kvara estas falsaĵo. La variolo venas nun kiel ĉiam, malgraŭ la vakcinado, sed nun la homoj scias pli bone flegi sin. Ĉar la variolo estas tute netiminda, se oni zorgas konservi la korpon varma kaj helpas la eliminon de venenoj per ŝvitigaj rimedoj (teo de tilio, de sambuko; ŝvitbanoj, k. a.), kovrante sin bone per litkovriloj. Oni ne devas manĝi, ĝis finiĝas la erupcio.

La medicinistoj ne fieru: se ni ne havas multe da variolo, ni havas pli multe da kancero, ftizo, tifoïdo, influenco, pneŭmonio ktp.

Kelkaj kamaradoj legintaj mian antaŭan artikolon en n-ro 48 de S. skribas al mi, plendante, ĉar mi malkonsilas la uzon de lakto, fromaĝo, ovoĵoj, k. s., ĉar laŭ ili oni ne bezonas mortigi la bestojn por ricevi tiujn nutraĵojn. Bone, mi ne diris tion pro kompato al la bestoj, mi malkonsilas la uzon de tiuj manĝaĵoj pro tio, ke ili enhavas tro grandan kvanton da proteinoj, kaj tro da proteinoj estas grava kaŭzo de malsanoj. *Karl Fröding (Rockford).*

## Senfadenaj ondoj de l' cerbo

La itala profesoro Ferdinand Carramali raportis pri tre interesaj eksperimentoj, ĉe kiuj la scienculo sukcesis konstati, ke el la homa cerbo eliras elektro-magnetaj ondoj, samspecaj kiel la eteraj ondoj, kiuj ebligas senfadenan telegrafion. Alivorte,

ni estas la senfadenaj sendstacioj kaj kapablaj akcepti senditajn ondojn de aliaj personoj, se nia ricevaparato, la cerbo, estas regulata je sama ondlongo. En plene izolita ĉambro profesoro Carramali eksperimentis kun vicoj da personoj, ties cerboj estis en forta efikado, kaj li sukcesis, ekkapti ties cerbondojn, por en sama ĉambro starigita senfadena ricevaparato. Li opinias en sia raporto, ke laŭ tio, oni povas konsideri kiel pruvon, ke la homo elsendas mallongajn ondojn laŭ elektromagneta speco, kaj, ke la sekreto de la telepatio, de la transigo de pensoj kaj de la legado en la cerbo trovis en tio sian naturan konkludon.

*Trad. 125.*

## La kooperativa movado en Britio progresas

Troviĝas en la lando 1314 konsum-kooperativaj societoj, kiuj havas membraron — 4<sup>3</sup>/<sub>4</sub> milionoj.

La akcia kapitalo estas funt. 92 000 000. La tenej-enhavo valoras funt. 34<sup>1</sup>/<sub>4</sub> milionojn. La butik-vendado valoras funt. 175 milionojn. El la konsum-societoj du havas membronombron de pli ol 100 000. La tuta movado dungas 111 820 disliverantajn laboristojn kaj 95 931 produktivajn, la salajroj pagitaj lastjare estis funt. 14 650 696 respektive funt. 10 946 291. La suma negocado de la movado egalas funt. 282 milionojn. Estis senrabata profito de funt. 21 396 596 kaj funt. 39 596 74 estis pagita kiel rento kontraŭ kapitalo.

150 250 funtojn oni uzis por subteni edukad-planojn kaj fordonis 119 596 funtojn al hospitaloj (malsanulejoj) ktp.

*1242.*

## Nombro da motor-veturiloj en la Mondo

je 1. januaro 1925

	Pasaĝer- aŭtomobiloj	Ŝarĝaŭto- mobiloj	Motor- cikloj
Usono	15 597 628	2 142 608	139 688
Britio	567 681	203 158	495 579
Kanado	597 278	93 414	7 953
Francio	460 000	115 000	102 000
Aŭstralio	180 000	18 000	55 000
Germanio	154 208	65 782	130 620
Argentino	120 000	5 000	2 850
Belgio	54 401	34 299	45 699
Italio	65 000	35 000	60 000
Hispanio	60 000	10 000	7 000
Aliaj landoj	758 849	169 676	215 635
	18 615 045	2 891 937	1 262 024

Kune je la 1. jan. 1925 = 22 769 006

je la 1. jan. 1924 = 15 763 000 | 2 345 000 | 1 077 000

je la 1. jan. 1924 = 19 185 000

je la 1. jan. 1923 = 15 500 000

## Solvita

### la problemo vidi malproksimen

D-ro *Karolus* de la fizika instituto en la Universitato de Leipzig sukcesis post longa kaj pena laboro, praktike solvi la problemon vidi kaj fotografi el malproksimo tute senmakule. La procedo de D-ro *Karolus* diferencigas de la konataj germanaj kaj amerikaj procedoj en la fotografado malproksima pro sia rapida labor-tempo. Estas eble en tempo de kelkaj sekundoj transigi bildon en grandeco 13:18 cm al loko malproksima. En la laboratio jam prosperis eksperimentoj, rapidigi la fotografadon ĝis dekona sekundo, per kio estas solvita la problemo de la malproksima videblo. D-ro *Karolus* nun vojaĝas al Ameriko, de kie li volas eksperimenti grandskale kun la Radio societo trans Nauen (Germanio).

## "Welt' pitshn"

Kvankam la afero estas apenaŭ priparolinda por ni, tamen estas interese, ekscii tiun fakton.

Jen nova vorto, naskiĝinta dum ĉi tagoj. Kaj ĝia signifo? — Ho, karaj gek-doĵ, tiu estas frapiga. —

Sidis jarlonge studprofesoro D-ro Baumann el München ĉe problemoj kaj serĉis solvon. Kaj vidu! Li nun aperas antaŭ la publiko kun la rezultato de siaj eksperimentoj, baptinte ĝin "Welt' pitshn" — mondlingvo!

Antaŭ 20 jaroj tia okazaĵo eble ne tro estis surpriziga. Siatempe Esp-o havis malmultan disvastiĝon kaj travivis situaciojn, kiuj verŝajnis iufoje ĝian pereon. Kaŭze de tio la semo de s-ro D-ro Baumann eventuale estus tiam fruktiĝinta. Sed nuntempe D-ro B. iom strange impresas kun sia elpensajo. Laŭ niaj konsideroj, temas pri granda naivulo ĉi-okaze. Por pravigi tiun vidpunkton, nur necesas iom profundigi en la ideologion de s-ro D-ro B. pri mondlingvo.

Li konstatas, ke ĉiuj (?) mondlingvoj tial fiaskis ĝis nun, ke iliaj gramatiko kaj sintakso tro bazas sur la romanaj lingvoj. Sed la germana kaj angla lingvoj estas la plej disvastigitaj kaj pro tio oni ĉefe ilin devas koncentrigi en mondlingvo. Ĉiu kiu scipovas la germanan lingvon, kapablas refuti tiun koncepton. La germana lingvo estas treege diferenca al la fremdaj lingvoj stile, same ankaŭ gramatike. Nur inter la vortoj estas kvanto internacia kaj tion Zamenhof bone konsideris, kreante Esp-on. Ke la germana lingvo estas disvastiĝinta en multaj landoj estas la sekvo de emigrado. Alilandanoj ne tro ŝatas studi la germanan lingvon. Ankaŭ la celado mondlingvigi la anglan lingvon antaŭe supozigas malsukceson. La anglaj vortoj ja estas tre malbone aliĝeblaj. En la historio de l' mondlingvo tio estas dokumentita per Volapük. Laŭ informoj tiu lingvo bazis sur aliĝitaj vortoj ĉefe derivataj el la angla lingvo. Se la mondlingvo nepre estu derivaĵo de tiu, parolata plej

multe, oni antaŭ ĉio devus atenti la lingvon de l' Ĉinoj!

Do, ĝis nun malsukcesis la mondlingvoj pro la tro romana karaktero! Estas tro riske aserti tion, ĉar eventuale la malo estas vera. Ekstudonte lingvon, la homoj plejparte elektas la romanon. Kaj kial? Ĉar la romanaj lingvoj estas la plej belaj kaj elastikaj. Kaj ĉar Esp-o iom pli inklinas al romanaj lingvoj, ĝi estas tre bela kaj parte dankas el tiu fakto sian sukceson.

Welt'pitshn kompreneble estas la plej facila lingvo! Oni skribas laŭparole: hoite = hodiaŭ, fon = de, doitsland = Germanio. Plue ĝi nur posedas 38 (!) regulojn kaj 1 artikolon "de" kaj "di" por la pluralo. Deklinaciata estas jene: de fater (patro), fon de fater, de fater. Per "tu" (fari) oni konjungacias: ich tu geen (mi iras), er (li) tu geen, wir (ni) tu geen. "Li" estas la finaĵo de l' pluralo: di faterli = la patroj, di folkli = la popolkantoj. —

Nun vi scias, karaj gek-doj, kio estas "Welt' pitshn". Kvankam ni ridete notas tiun fakton por poste ignori ĝin, ni profitu el tio. Ni atentigu propagandante, kiel per tiu nova lingvo ĉiuj reformsistemoj estas juĝataj netaŭgaj kaj ankaŭ Welt' pitshn ne estos la lasta rezultato de partecaj kritikemuloj sur la teritorio mondlingva. Kaj ĉiu homo iomete komprenanta la aferon, agnoskos la vojon de l' Esp-istoj kiel sole ĝusta.

Dum studprofesoro s-ro D-ro Baumann el München baldaŭ spertos, ke tro malfrue maturiĝis sia genieco por krei mondlingvon, Esp-o daŭrigos la marŝon transmondan kaj fine estos konkirinta ĝin.

E. Meyer (1072)

### Esperanto oficiale rekonita kiel "klara lingvo"

Paris, 29. oktobro 1925. La Internacia Konferenco de la Membroj-Ŝtatoj de Universala Telegrafa Unio ĵus rekonis oficiale Esperanton laŭ la rekomendo de la 5-a Plenkunsido de Ligo de Nacioj. Artikolo 7 de Internacia Telegrafa Regularo antaŭvidis la uzon de la naciaj lingvoj kaj de Latino. La lasta paragrafo estis kompletigata laŭjane: "La uzo de Latino kaj de Esperanto estas sammaniere allasata."

La franca delegacio aktive kunhelpis al la adopto de tiu amendo, kiu donas al Esperanto definitive la karakteron de oficiale rekonita internacia helplingvo.

Simila propono koncerne Idon estis malakceptata.

Abonu

### "Sennacieca Revuo"

MONATA ORGANO DE

SAT

LITERATURA — SCIENCA  
PEDAGOGIA

### "Festotago de l' Rikolto"

(Sovet-Unio, Smolensk.)

En la agrikultura lando — Sovet-Unio — la rikolto estas la plej grava afero. De ĝi dependas bonstato de l' tuta respubliko, pro ĝi nin unu post alia "ekamis" aliaj landoj. Kaj la rikolton en nia lando multaj kareseme kaj estimeme nomas "kamarado Rikolto".

15. oktobro la tuta Sovet-Unio festis "Tagon de l' Rikolto". En Smolenska "Domo de l' Kamparano" (kamparana klubejo) por tiu-ĉi tago estis aranĝita gubernia agrikultura ekspozicio.

De l' mateno ĝis malfrua nokto la "Domo de l' Kamparano" kvazaŭ vestigis festo-vestaĵojn. Gaje lumas sennombraj elektrolampetoj. Sur muroj — belartefaritaj anoncoj kun devizoj krias per grandaj literegoj, ĉe enirpordo, sur granda korto kaj en la domo mem zumas amaso.

"La Domo de l' Kamparano" antaŭe ĉe la cara reĝimo estis domo de l' guberniestro. Ĝiaj muroj multfoje vidis bruplenajn balojn kaj festojn de l' guberniestraj gastoj. Sed unuan fojon ili vidas gastojn en simpla, dome teksita vestaĵo, en freŝodoranta felvestaĵo, kun ĉifitaj de vento kaj bruligitaj de suno vizaĝoj. Kamparano, nigretera, panon donanta aro hodiaŭ festas.

Sur korto troviĝas fako de agrikulturaj maŝinoj kaj iloj. Kiel soldatoj, unuvic

staras plugiloj, draŝiloj, semiloj, rikoltiloj, falĉiloj. Spiregas la traktoro kaj kun sonanta bruo turniĝas moviĝanta de ĝi draŝilo.

Apud la traktoro staras plej multo de kamparanoj. Longebarbaj, ili penas stari pli proksime al tiu-ĉi nova por ili maŝino. Ili rigardas miriĝintaj, malmulte ne kredas je laborkapableco de l' maŝino, demandas. Sed videbla laborado de l' traktoro nuligas ilian malkredon.

Ĉe la kortbarilo staras ĉevaloj. Jen — ĉevalino "Ondo", bruna, bonrasa belulino, apartenanta al kamparano Frolo Kornejev, el Ĥohlovskaja regionero. La ĉevalino ricevis monpremion ĉe la tutunia, Moskva kaj gubernia ekspozicioj. Apud la "Ondo" staras unujara ĉevalino "Fortulino", apartenanta al frato de Kornejev kaj ricevinta ankaŭ la unuan premion ĉe la Smolenska ekspozicio. Ankaŭ ĉi-tie staras ĉevalviro "Danser", apartenanta al kamparano Ĥoduŝev. "Danser" ricevis premiojn ĉe la tutunia kaj Smolenska ekspozicioj. Ĉiu vidas, kiel fortaj, sanaj ĉevaloj dank' al zorgoj de iliaj mastroj anstataŭas iaman kamparanan ĉevalaĉon.

En la supra etaĝo de domo troviĝas legomoj kaj fruktoj el kamparanaj fruktaj legomĝardenoj. Ankaŭ ĉi-tie estas dismetitaj specimenoj de l' kulturaj panoj kaj specimenoj de l' malnova tripeca kaj nova multpeca agrikulturaj maŝinoj.

Sur la sceno kuŝas legomspecimenoj el ĝardeno de l' loka malliberejo. Soveta

### LASTAJ NOVAĴOJ

En Wien komenciĝis la striko de bakistoj. Panmanko jam grave estas rimark-ebla.

Pro rompiĝo de remparo ĉe Eignau-lago en Nordwales la vilaĝo Volgorog estis, per al valo falegantaj akvomasoj, pereigita. Dek personoj estas maltrovitaj. La fluego detruis la ponton kaj kaŭzis grandajn dezertigojn. Multaj urboj estis en mallumo, ĉar la livero de elektro estis interrompita. Lasta sciigo diras, ke dek mortintoj estas trovitaj dum dudek personoj ankoraŭ mankas.

La rusa popolkomisaro por militaj aferoj, k-do Frunse, mortis sabaton, la 31. oktobro. Mardon, la 3. nov. okazis lia solena entombigo. Frunse estis unu el la plej aktivaj lab.-gvidantoj antaŭ- kaj postmilitaj.

La polico en Sorrent entreprenis revizion en la domo de Maxim Ĝorki, por klarigi pri la rilatoj de lia sekretario kun la italaj komunistoj.

Post definitiva konstato en la balotoj per la kanada parlamento estas elektitaj: 118 konservativoj, 124 liberaloj kaj sendependuloj.

(Posttelegrafa kontoro, Tver). En Petrozavodsk komencis funkcii la seg-uzino, ne funkciinta kvin jarojn. Pro tio estas likvidita senlaboreco inter lignaĵistoj.

malliberejo ne nur malkutimigas malliberulon de la krimoj, sed samtempe kutimigas lin al bona laboro. Apude Engelgardta eksperimenta stacio montras siajn specimenojn de lino.

Fako de hejmaj laboristoj. Ĉi-tie ni vidas rezultaĵon de longtempa, malfacila laborado, ekzemplon de l' obstino kaj venko — muelŝtonojn de kamarado Saarek. En la jaro 1917 sur kampoj de l' Elninska regiono li komencis kolektadi akrajn ŝtonojn kaj dispecigadi ilin per manmartelo. Regionaj kamparanoj opiniis lin frenezulo, sed nun liaj muelŝtonoj estas uzataj ne nur en ĉiuj muelejoj de l' regiono, sed ankaŭ de tuta Sovet-Unio. Saarek mem estas preskaŭ malalfabetulo, sed li unua el tuta regiono elektrizis sian vilaĝdomon, aranĝis en la vilaĝo telefonon kaj legejon. Li havas en sia muelejo laŭtparolilon, kaj kamparanoj, alveturante mueli, sidiĝas sur sakojn kaj aŭskultas paroladon el Moskvo.

En anguleto pendas bildoj, faritaj de pentristo — memlernulo k-do Golovkin. Neniu deziras kredi, ke belartefaritaj pentraĵoj estas faritaj el... forĵetaĵoj, pecetoj de putra arbo, bastonetoj, musko, vato ktp....

Ni denove staras ĉe la enirpordo. Portreto de Lenin rigardas de l' muro. Kaj ni sentas: "Li, lia ideo donis tion, montris vojon al malklera antaŭe kamparano." Erskij.

## La horloĝo kiel kompasoj

Se oni volas orienti sin en nekonata regiono kaj ne havas kompasojn, tiam sufiĉas poŝhorloĝo, supoze, ke la suno brilas. Oni devas teni la horloĝon horizontale tiel, ke la hormontrilo montras direkte al la suno. Tiam la duoniga linio de la alcentra angulo inter la hormontrilo kaj la radiuso iranta al la cifero XII, la nord-sudlinio, la duoniga linio mem montras suden, ĝia plilongigo norden. Por ekkoni la ĝustecon de tiu aserto, oni konsideru jenon: La suno turniĝas cirkle dum 24 horoj unufoje. Se ankaŭ la hormontrilo dum 24 horoj cirkulus unufoje, kaj montrus je 12a horo tagmeze al la suno, t. e. en ĉi-momento suden, ĝi montrus dum tuta sia cirkulado ĉiam al la suno. Inverse, se oni ĝin lasus montriĝi al la suno je laŭvola tempo, la al 12 celanta radiuso montrus suden, do la al 11 celanta norden. Sed nun la hormontrilo dum 24 horoj cirkulas dufoje, sekve duoble pli rapide ol la suno. Se ĝi montras je la 12a al la suno, ĝi ekzemple je la 2a jam duoble pli antaŭas ol la suno, ĝi montras al 2, dum la suno nur atingis 1, kaj sudo koincidas kun 12. Se la hormontrilo nun (je la 2a) denove montras al la suno, ni devas turni la horloĝon je  $\frac{1}{12}$  de ĝia periferio, tiel ke 2 okupas lokon de 1, kaj la montrilo ree koincidas kun la sunlinio, sed tiam 1 okupas lokon de 12, t. e. 1, staranta meze inter 12 kaj 2, montras suden. Tio sama rilatas al aliaj horoj.

## VERA KRISTANO

Moiseo Nadir

I.

Li krucosignas sin kaj diras:

Mi havas bonan karakteron, mildan, ameman, kristanan. La evangelio ne forestas de sub mia kuseno. Ĉiuvespere antaŭ ol mi ekdormas, mi legas iomete en la sankta libro. Tio faras min pli nobla, pli bona, pli homeca. Antaŭ kelka tempo vangobatis min iu, tial ĉar mi diris, ke la krista religio estas pli milda ol la juda. Kaptis mi varmegan glason da teo kaj brulvundis lian vizaĝon. Poste mi lin ekjetis teren kaj piedpremadis. Post tiu batado, mi delasis kapon, turnis al li duan vangon kaj diris: "Nu provu, batu!"

\* \* \*

Mi havas kristan karakteron. Mia animo brulas milde kaj honte, kiel la olivoleo en sankta lampo super la bildo de l' Krucumito, mi estas plena de kompato, kaj mia animo estas ĉiam depremita. Mi senkulpigas ĉiun per pura, krista senkulpigo. Mi scias: La vivo estas flua rivero. Ni — la bordoj, kiuj formas ĝin. La tempo forhakas nin, sed la rivero ne fariĝas kaŭze de tio pli mallarĝa, sed pli larĝa.

Mi estas pie kredanta, monaĥeja, melankolia homo. La plej granda plezuro mia estas *pardonis*. En ĉi okazo mi estas *dia*. Mi volus, ke homoj kulpiĝu iom pli kompare al mi, por ke mi povu varmiĝi en la sento de kompato al aliaj. Mi ĉiam diras: Se malriĉuloj en la mondo ne ekzistus, devus mi iun priŝteli, por ke mi povu poste helpi al li.

\* \* \*

Antaŭ kelka tempo, nokte, mi foriris de mia loĝejo. Mia edzino estis sola en la ĉambro. (Ni loĝas ie en angula strato), kaj mia malgranda filineto kuŝis pro granda febro en la lito kaj ĝemis treege. Mi sentis dezirojn konfesi antaŭ iu miajn koresentojn kaj deklari, ke mi *pardonas al ĉiuj*. Mia edzino min tre malmulte komprenas, ŝi ne taksas mian pure-kristanan naturon. Laŭ ŝi mi devis resti tutan vesperon hejme, ĉar la infano malsanas. Mi diris al ŝi: "Mia amata edzino! Mi pardonas al ĉi pro ĉiaj vortoj." Mi petis ŝin, ke ŝi ne ekdormu, ĉar mi ne havas ŝlosilon al la ekstera pordo. Ŝi nomis min "homo sen koro!" Sed mi pardonis al ŝi kaj foriris.

Kiam mi revenis (kvarono post la kvina matene), histeriigis mia edzino. Ŝi ploris, membatis sian kapon, diris ke la infano estas tre malsana kaj ke oni devas voki doktoron. Mi komencis senvestiĝi kaj respondis, ke mi al ŝi nepre pardonas pro ŝia ploro kaj ĉio alia. Kaj, ke la infano estas tre malsana — mi ankaŭ al ŝi pardonas, kvankam ĝi estas de mia propra ŝango kaj korpo. Mi *ĉion* kaj al ĉiuj pardonas. Poste mi kuŝiĝis dormi kun kvietigita konscienco.

\* \* \*

Dua okazintaĵo: Venis al mi konatulo — de Aŭstrio — kaj diris, ke li mortas pro malsato. Eble povas mi al li per io helpi? Se ne, tiam — — —. Mi rigardis lin bone, demandis, ĉu li konas la Novan Testamenton. Li diris: "Mi pensas pri nenia religio. Mi volas *manĝi!*" Li komencis imagi al mi, kiel lia tuta familio estingiĝas kvazaŭ kandelo kaj kiel li mem apenaŭ staras surpiede... Kaj mi petas vin, diras li, faru ion por mi... Donu al mi ion, diras li, de sur via tablo... Ĉar mi ne povas jam plu — — —.

Ĉe ĉi vortoj li falis svenante. Mi tuj telefonis al ia hospitalo, ke homo svenas kaj ke oni sendu iun kiu lin savu.

Kiam oni lin savis, mi lin prenis — (kune kun la hospitaldoktoro) ĉe la mano kaj helpis al li eliri surstraten.

"Vi ne helpas al mi?" diris li per malseka voĉo kaj la bluaj lipoj tremis ĉe li. "Ne!" diris mi, "mi al vi ne helpas, sed mi pardonas al vi el la tuta koro. Vi eĉ", diras mi, "ankoraŭ dekfoje sammaniere mortis pro malsato, mi al vi pardonas, ĉar estas jam en mi tia kristana naturo. — — —

El juda lingvo: M. Tuler.

## "Amuza Anguleto"

— Dum unu kortega tagmanĝo ĉe Ludwig XIV. estis analizataj filozofiaj aferoj. Boileau (elparolu: bualo) esprimis sin: "Ĉiuj homoj devas morti." Tiam lin trafis akra rigardo de monarĥo kaj Boileau korektis sin momente:

"Preskaŭ ĉiuj homoj! preskaŭ ĉiuj!"

— Marŝalo Mac Mahon faris foje revuon pri militedukatoj de St. Cyr. Tiukaze al li estis prezentita ankaŭ juna Afrikano.

"Ah vous êtes un nègre" (ha, vi estas negro).

"Oui mon maréchal" (jes, mia marŝalo).

"Eh bien, continuez comme ça!" (nu bone, daŭrigu tiamaniere).

— Dum kortegbalo en Romo aperis la edzino de financministro Depretis tre forte dekoltita.

La reĝo turnis sin al sia kortegmarŝalo: "Tiel ankaŭ la edzo de l' sinjorino venos al mi ĉiam kun nekovrita deficitto."

Elgermanigis S. Kreĉetnikof.

## Historio pri la homo, simio kaj homsimio

Antaŭ ne longe usona trusto interese eksperimentis en siaj fabrikoj. Post maldungo de siaj laboristoj ĝi anstataŭis ilin per simplaj simioj. La trustsinjoroj havis la percepton, ke la simioj sambone kiel la homoj povus servi la mekanikajn aparatojn, ke ili estus pli malkaraj laborfortoj kaj neniam ekzistus danĝero, ke ili organizus sin. La eksperimento malsukcesis. La simioj laboris nur tiom, kiom laŭ ilia opinio valoris la potaĝa nutraĵo. De komenco de ilia dungo la simioj promesis inter si reciprokan fidelon, solidarecon kaj subtenon. Kiam oni komencis ilin ekspluati, turmenti kaj ĉikani, la simioj unuanime kaj unuecfrente minacante kontraŭstaris, kaj la majstroj tuj devis forkuri. Jam la duan tagon la simioj komencis ĝeneralan strikon, ĉar oni postulis de du el ili fari kromhorojn, nome, labori naŭ horojn potaĝe. Ĉar oni ne sukcesis, la trusto maldungis la kontrakton kun la similiveranto kaj post mallonga tempo denove homoj staris ĉe la maŝinoj. Kaj ĉio denove bonfunkciis: La homaj "simioj" toleris ekspluaton liveris la kvaroblan laboron por mizera nutraĵo, ili restis malkuraĝaj, malsamopiniaj, sensolidarecaj kaj, se iu inter ili admonis por unuigo, alia kolego iris al la estro kaj denunciis la ribelinton, kiu tuj devis forlasi la laborejon. Novaj vipoj estis liverataj, ĉar la simio forbruligis la malnovajn jam dum la unua tago.

Tio estas la historio pri la homo, simio kaj homsimio. Trad. F. A.